

Martin Luther,  
Vom Himmel hoch, da  
komm ich her

Martin Luther,  
De la ĉielo venas  
mi

Martin Luther,  
El alta ĉielo

*tradukita de Manfredo Ra-  
tislavo*

*tradukita de Joachim  
Gießner*

1.) "Vom Himmel hoch da komm ich  
her,  
ich bring euch gute neue Mär;  
der guten Mär bring ich so viel,  
davon ich sing'n und sagen will.

1.) "De la ĉielo venas mi,  
rakonti volas mi al vi  
pri ege bona, nova aĵ';  
jen estas mia raportaĵ'.

1. El alta ĉielo portas mi  
novaĵon bonan jen al vi.  
Pri dibonec' kaj difavor'  
kantadas nun l'angela ĥor'.

2.) Euch ist ein Kindlein heut geborn  
von einer Jungfrau auserkorn,  
ein Kindelein, so zart und fein,  
das soll eu'r Freud und Wonne sein.

2.) Hodiaŭ naskis virgulin'  
infanon, kiu savos vin.  
ĝi estas fil' de nia Di',  
ĝojeju vi pro tiu ĉi!

2. Infan' naskita ja por vi  
de virgulin' pro grac' de Di'.  
Kaj delikate li sen fin'  
ĝojigu amoplene vin.

3.) Es ist der Herr Christ, unser Gott,  
der will euch führn aus aller Not,  
er will eu'r Heiland selber sein,  
von allen Sünden machen rein.

3.) ĝi estas Kristo, nia Di',  
el la mizer' vin gvidos Li.  
Li volas esti la Savant',  
de viaj pekoj purigant'.

3. Li estas Kristo, la Sinjor',  
kondukos mondon el dolor'.  
Savanto estos li por vi,  
purigos vin de l'pekoj li.

4.) Er bringt euch alle Seligkeit,  
die Gott, der Vater, hat bereit',  
daß ihr mit uns im Himmelreich  
sollt leben nun und ewiglich.

4.) Alportas feliĉegon ĝi  
al vi de l' patro, nia Di',  
ke vivu vi en la ĉiel'  
kun ni en la eterna hel'.

4. ....  
.....  
.....  
.....

5.) So merket nun das Zeichen recht:  
die Krippe, Windelein so schlecht,  
da findet ihr das Kind gelegt,  
das alle Welt erhält und trägt."

5.) La signon memorigu vi:  
En stala trogo kuŝas ĝi,  
troviĝas tie la infan',  
tenanta ĉion en la man'."

5. ....  
.....  
.....  
.....

6.) Des laßt uns alle fröhlich sein  
und mit den Hirten gehn hinein,  
zu sehn, was Gott uns hat beschert,  
mit seinem lieben Sohn verehrt.

6.) Eniru ĝoje ĉiuj ni  
kun la paŝistoj tien ĉi,  
por vidi, kion donis Di'  
per Sia filo nun al ni.

6. Ni laŭdu lin per ĝoja son'  
kaj iru al la dia don'.  
Kun la paŝistoj vidu ni  
la filon, kiun sendis Di'.

7.) Merk auf, mein Herz, und sieh  
dorthin;  
was liegt dort in dem Krippelein?  
Wes ist das schöne Kindelein?  
Es ist das liebe Jesulein.

7.) Atentu vi, ho mia kor',  
rigardu tiun en ador'.  
Jen kuŝas nude en troget'  
la ege kara Jesuet'.

7. ....  
.....  
.....  
.....

...

...

...

8.) Sei mir willkommen, edler Gast! Den Sünder nicht verschmähet hast und kommst ins Elend her zu mir, wie soll ich immer danken dir?	8.) Jesu', mi bonvenigas Vin, ĉar Vi ne malakceptas min, vizitas mizerulon min; aĥ, kiel mi nur danku Vin.	8. .... ..... ..... .....
9.) Ach Herr, du Schöpfer aller Ding, wie bist du worden so gering, daß du da liegst auf dürrem Gras, davon ein Rind und Esel aß!	9.) Sinjor', de ĉiu aĵ' kreul', aĥ, kia iĝis Vi etul'! Vi kuŝas sur la fojno jen, de kiu manĝis la azen'!	9. .... ..... ..... .....
10.) Und wär die Welt vielmal so weit, von Edelstein und Gold bereit', so wär sie doch dir viel zu klein, zu sein ein enges Wiegelein.	10.) Se estus tiu mondo pli grandega ol nun estas ĝi, malvastus tamen ĝi por Vi, samkiel tiu trogo ĉi!	10. .... ..... ..... .....
11.) Der Sammet und die Seiden dein, das ist grob Heu und Windelein, darauf du König groß und reich herprangst, als wärs dein Himmel- reich.	11.) Ne per silkvesto kaj ve- lur', vestita eatas vi ja nur per vindaĵoj; sed en tiuj ĉi aspektas kiel reĝo Vi.	11. .... ..... ..... .....
12.) Das hat also gefallen dir, die Wahrheit anzuzeigen mir, wie aller Welt Macht, Ehr und Gut vor dir nichts gilt, nichts hilft noch tut.	12.) Plaĉinta estas ja al Vi, elmontri tiel nun al ni, ke antaŭ vi de l' mondo or' ja estas tute sen valor'.	12. .... ..... ..... .....
13.) Ach mein herzliebes Jesulein, mach dir ein rein sanft Bettelein, zu ruhen in meins Herzens Schrein, daß nimmer ich vergesse dein.	13.) Ho, mia kara Jesuet', farita estu la litet' por Vi en mia kora ŝrank'; mi ne forgesu vin pro dank'.	13. .... ..... ..... .....
14.) Davon ich allzeit fröhlich sei, zu springen, singen immer frei das rechte Susannine schön, mit Herzenslust die süßen Tön'.	14.) Pro tio ĝoje saltu mi kaj kantu laŭ la melodi' de laŭdokanto al Via glori', ho mia kara Di-Sinjor'!	14. .... ..... ..... .....
15.) Lob, Ehr sei Gott im höchsten Thron, der uns schenkt seinen eingen Sohn. Des freuen sich der Engel Schar' und singen uns solch neues Jahr.	15.) Honor' kaj laŭd' al nia Di', ĉar Sian filon donis Li al ni surtera la homar'. Ni ĝoju kun la anĝelar'!	15. Al Dio glori', honor' kaj graci' pro lia fil', ĉieldonaci'. L'anĝeloj ĝoje kantas nun pri estonteco kaj fortun'.
...	...	...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas MARTIN LUTHER (\*1483 – †1546), publikigita 1535.*

*Arg-483-939 (2008-12-27 15:47:32)*

*Im deutschen katholischen Gesangbuch "Gotteslob" ist auch folgende einführende Strophe, die im Jahre 1555 von Valentin Triller verfasst worden war, abgedruckt:*

*0.) Es kam ein Engel hell und klar  
von Gott aufs Feld zur Hirtenschar;  
der war gar sehr von Herzen froh  
und sprach zu ihnen fröhlich so:*

*Traduko de la Germana poemo "Vom Himmel hoch, da komm ich her" de MARTIN LUTHER (\*1483 – †1546) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-483-940 (2008-12-27 15:47:22)*

*En la katolika preĝo- kaj kantlibro de la episkopejo Monastero/Vestfalia (MÜNSTER / WESTFALEN), Germanujo, estas antaŭmetita kiel la unua strofo enkonduka strofo, kiu klarigas, ke la sekvaj kvin strofoj estas la parolo de la anĝelo, kiu anoncas al la paŝtistoj la naskiĝon de Jesuo. Jen la Esperantigo de tiu enkonduka strofo:*

*0.) Jen venis kun miriga klar'  
anĝelo al la paŝtistar';  
sendita estis li de Di'  
kaj jenajn vortojn diris li:*

*Traduko de la Germana poemo "Vom Himmel hoch, da komm ich her" de MARTIN LUTHER (\*1483 – †1546) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-483-1241 (2012-10-18 10:43:28)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.*